# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**

## AMO en tri kontinentoj

- AMO 60 en Ukrainio
- AMO 61 en Burundo
- AMO 62 en Nov-Zelando

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-15 sendita el Budapeŝto la 24an de oktobro.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj, sed multaj resaltoj!*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO: tri seminarioj – tri kontinentoj

La jarfina periodo prezentas por AMO grandegan geografian etendon– tio atestas, ke la AMO-programo vere estas tutmonda, pli ol Universalaj Kongresoj iam ajn atingis. Ene de ses semajnoj, la programo tuŝos Eŭropon, Afrikon kaj –unuafoje – Oceanion.

## AMO 60 en Kijivo, Ukrainio - diskutplano

Tiu seminario okazos kadre de la Nacia Kongreso okazanta fine de novembro. Jen la temaro por diskutado kaj laboro.

1) Esplori la rekomendojn el AMO 59 en Timisoara, Rumanio (vidu en EKO 14)
   - kiomgrade en Ukrainio tiuj rekomendoj esatas jam sekvataj?
   - kiomgrade ili estas aplikeblaj al Ukrainio?
   - kiuj el la rekomendoj estas sekvindaj tra la venontaj jaroj?



Sceno el AMO 52 en Lviv, Ukrainio antaŭ unu jaro.

2) Ĉu vi povos elpensi pli da rekomendoj por fortigi la landan agadon?

- por la nova estraro de UkrEA?
- por la lokaj kluboj aŭ societoj tra Ukrainio?
- por la pli vasta regiono de Centra Eŭropo?
- por planataj renkontiĝoj?
- por UEA, TEJO, ILEI kaj aliaj internaciaj Eo-organizoj?

3) Laborfortoj kaj laborgrupoj

- kiuj laborgrupoj utilus por la movada antaŭenigo kaj subteno al la estraro?
- al kiuj laborgrupoj vi persone povos kaj volos fari kontribuon?
- kiuj transnaciaj kontaktoj troveblas por apogi la laboron de la enlandaj grupoj?

## AMO 61 en Bujumburo, Burundo – temaro kaj alvoko

Ene de 62 tagoj komenciĝos la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Bujumburo, la ĉefurbo de Burundo. Ne estas surprizo, ĉar en ĉi parto de Afriko, esperantistoj montris grandan emon organizi internaciajn aranĝojn por diskonigi Burundon kaj ties vidindaĵojn al la mondo.

Estos okazo por eksterburundanoj konatiĝi kun la burunda tamburo, kiu nun estas inter la homa heredaĵo (akceptita de UNESKO en 2014), folkloraj dancoj kaj viziti diversajn lokojn de Burundo kaj de ĝia suda parto. Ne maltrafu la okazon sin bani en termala akvo, kiu havas terapian povon kontraŭ multaj malsanoj!



Sceno el AMO 29 en decembro 2016 kadre de la 6a AKE en Bunda, Tanzanio.

Krom la kongresaj programeroj, okazos ankaŭ la 61a AMO-seminario, kaj ĝin gvidos spertaj esperantistoj, kaj estraranoj de UEA. Temoj:

- Kiel organizi internaciajn eventojn
- Tutmondiĝo kaj bona komunikado kaj ne-perforta komunikado
- Interreto kaj Esperanto en Afriko
- Bona varbado kaj membrovarbado (UEA)
- Deĵorado de Mireille Grosjean ĉe UN kaj kun diversaj ministroj.

- Grupa laboro: kiel verki gazetaran komunikon.
- Strukturo de la movado (kiel funkcias UEA, ILEI, TEJO....) kaj bona organizado de kluboj/asocioj.
- Kontraŭ diskriminacio kaj por genra egaleco.

Pri la 7a Kongreso, vidu: https://www.esperanto-afriko.org/7aake.htm

Teksto de UEA-estrarano Jeremie Sabiyumva.

## AMO 62 el Aŭklando, Nov-Zelando – malfermo al nia lasta kontinento

Kadre de la du-landa kongreso (jan 10-19, 2020) kiu kunigos esperantistojn el Aŭstralio kaj Nov-Zelando, okazos la 62a AMO-seminario, kun la sekva proponata temaro: 'Florigo Esperanton tre for de Eŭropo.'

Okazos FLAM-analizo, laŭ la alivortumita temo: 'Kiel atingi Oceanian refortigon'.

En tiu analizo, la seminarianoj diskutos en grupoj por listigi la fortojn de la Oceania Eo-movado kaj aliflanke ĝiajn lamajn punktojn. Temas do pri faktoroj, kiujn la esperantistoj mem povas influi kaj eĉ formi. Egala aŭ eĉ pli grava tasko estas analizi la influon de la oceaniaj socioj: do faktoroj kiuj ege influos la movadan florigon aŭ velkon, sed kiujn la movadanoj apenaŭ povas influi.  Do, la grupo listigos la Avantaĝojn kaj Minacojn kiuj venas el la pli granda mondo. Sekve, jen la Akronimo FLAM: Fortoj, Lamaĵoj, Avantaĝoj, Minacoj.

Analizo estas kompreneble nur la unua parto de la procezo. Valoras analizo, sed ĝi vanas sen la dua paŝo: formulado de solvoj aŭ strategioj por bonigi la situacion. Ni nomas tiun parton EKEK.



Tio estas:

**E**voluigi la Fortojn
**K**uraci la Lamaĵojn
**E**kspluati la Avantaĝojn
**K**ontraŭi (aŭ mildigi) la Minacojn.

El tiu ekzerco povos flui rekomendoj kaj laborplanoj.

Informoj pri la kongreso: http://aea.esperanto.org.au/kongreso/?lang=eo

Vortoj: 735

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.